

# La Martirakto el Skilio

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling

## *Interrete:*

### *La originala Latina teksto:*

[http://www.hs-augsburg.de/~harsch/Chronologia/Lspost02/PassioScil/pas\\_scil.html](http://www.hs-augsburg.de/~harsch/Chronologia/Lspost02/PassioScil/pas_scil.html)

### *La Latina teksto kun Angla traduko:*

<https://books.google.de/books?id=LFILAwAAQBAJ&pg=PA78&lpg=PA78&dq=%22>

*Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-02*

# *La Martirakto el Skilio*

## *Passio sanctorum scillitanorum*<sup>1</sup>

*La unua datebla Latinaĵo kristana estas la Martirakto el Skilio en Nord-Afriko. Ĝi estas atestaĵo pri la obstina konvinkiĝo de la nov-konvertitoj. Grupo da gekristanoj el la komunumo Skilio (Scilium aŭ Scillium) estas kaptita en 180 p. K. – kaj jen la «protokolo»:*

**1** Kiam Prezento (duafoje) kaj Klaŭdiano estis konsuloj, dek ses tagojn antaŭ la kalendoj de aŭgusto, alvenis en la oficejon de la prokonsulo Sperato, Nartzal' kaj Kitin', Donata, Sekunda kaj Vestia; prokonsulo Saturnino diris:

Vi povas ricevi indulgon de nia Sinjoro, se vi returniĝas al saĝeco.

**2** Sperato diris: Neniam ni malbonfaris, fiaĵojn ni neniam kulpis, neniam ni malbenis, sed malbontraktate ni dankis; pro kio ni obeas nian imperiestron.

**3** Saturnino prokonsulo diris: Ankaŭ ni estas religiemaj kaj simpla estas nia religio kaj ni ĵuras je la genio de nia Sinjoro imperiestro kaj pro lia bonfarto ni preĝas; tion fari devas ankaŭ vi.

---

<sup>1</sup> ankaŭ: Scilitanorum.

4 Sperato diris: Se trankvilajn orelojn vi proponas, mi diros la misteron de l' simpleco.

5 Saturnino diris: Al vi, komencanta fiaĵojn pri niaj sanktaĵoj, mi ne proponas orelojn. Sed prefere vi ĵuru je la genio de nia Sinjoro imperiestro.

6 Sperato diris: Imperion de ĉi tempo mi ne rekonas, sed prefere mi servas al tiu Dio, kiun vidis neniu homo, nek povas vidi per kiu ajn okulo. Mi ne faris ŝtelon, sed se ion mi aĉetis, skrupule mi pagis impostojn, ĉar mi konas mian Sinjoron, la imperiestron de reĝoj kaj de ĉiuj popoloj.

7 Saturnino diris al la ceteraj: Ĉesu aparteni al ĉi vivsinteno.

Sperato diris: Malbona sinteno estas: murdi homojn aŭ false atesti.

8 Saturnino prokonsulo diris: Ne partoprenu ĉi frenezecon.

Kitin' diris: Ni ne havas, kiun timi, krom nia Sinjoro, kiu estas en la ĉieloj.

9 Donata diris: Honoro al la Cezaro kiel al Cezaro, sed timon al Dio!

Vestia diris: Mi estas kristanino.

Sekunda diris: Kio mi estas, tio esti mi volas.

10 Saturnino prokonsulo diris al Sperato: Ĉu vi obstinas esti kristano?

Sperato diris: Mi estas kristano.

Kaj kun li ĉiuj konsentis.

11 Saturnino prokonsulo diris: Ĉu vi ne deziras iom da tempo, por preparoli?

Sperato diris: En afero tiel justa ne estas preparolo.

12 Saturnino prokonsulo diris: Kio estas tiuj aferoj en via skatolo?

Sperato diris: Libroj kaj leteroj de Paŭlo, homo justa.

13 Saturnino prokonsulo diris: Prokraston de tridek tagoj vi havu kaj vi bone pripensu!

Sperato ree diris: Mi estas kristano.

Kaj kun li ĉiuj konsentis.

*Tie ĉi oni devas imagi al si paŭzon de tridek tagoj; la akto jene daŭriĝas (dum intertempe ŝajne kelkaj aldoniĝis al la grupo):*

14 Saturnino prokonsulo voĉlegis la verdikton de la vakstableto: Sperato, Nartzal', Kitin', Donata, Vestia, Sekunda k. c., kiuj konfesis vivi laŭ kristana religio, estas, ĉar ili, malgraŭ proponita eblo returniĝi al Romia vivstilo, obstine persistis, kondamnitaj al la morto per la glavo.

15 Sperato diris: Al Dio ni dankas.

Nertzal' diris: Hodiaŭ ni estas martiroj en la ĉieloj. Al Dio dankon.

16 Saturnino prokonsulo ordonis, ke heroldo diru:

Sperato, Nartzal'. Kitin', Veturio, Felikso, Akvilino, Letancio, Januaria. Generosa, Vestia, Donata kaj Sekunda estas kondamnitaj.

17 Kune ĉiuj diris: Al Dio dankon.

Kaj tuj ili estis senkapigitaj pro la nomo de Kristo.

---